
# Aŭstraliaj Esperantistoj



## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 25/03/2021 Kvincentdudektria eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron


Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

## Entute 833,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **295,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **245,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **221,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)


Nun studas **72,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2021)

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).






**N.ro 27 de "Por Komencantoj". GRAMATIKAJ KVIZETOJ:**

Respondu al la demandoj post kaj pri la jena frazo:

"En la vespero ni intencos elekti nian amikon Rejnaldo prezidanto de nia klubo."

1). Kiun vorton oni povas meti antaŭ la vorto "prezidanto" por fari la frazon pli rapide komprenebla?

2). Kiel tekstas la resto de la frazo se ni komencas per "En la vespero ni intencos elekti nian amikon Rejnaldo ke .............. .

3). En kiuj bonstilaj lokoj en la frazo povas oni meti "en la vespero"?

Vi trovos la solvon de la kvizeto ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *



**La** Esperanta Retradio **donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.** http://esperantaretradio.blogspot.co.at/?view=magazine



* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

https://twitter.com/i/status/1245591199034929153

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater Cafe 28-29 Suda Stejno. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj. La 20a de marto estis la tria sabato. Pluvegis. La kunveno estis nuligita. Miaj ranoj treege ŝatis la veteron kaj laŭte kantis tage kaj nokte, dum multaj tagoj. Ĝis nun, ne plendis la najbaroj.





*Roger Springer*

## Kio estas Mono?



Ĉu mono estas la havebla energio en la mondo. Uzo de la rezervejo de energio de antaŭaj jaroj, Oleo? Gaso? Karbo? Atomo? riĉigas la homaron. Nia ekonomia sistemo bezonas la fluon de mono por funkcii. Se ĉiuj homoj povus elspezi, la sistemo funkcius bone. Sed oni povus aĉeti nur se oni havus monon en la poŝo. Komputiloj kaj lertaj maŝinoj ne povus elspezi monon. Do la registraro nun fordonas monon por solvi tiun problemon sed inteligente.

## Universala baza enspezo (UBI)

### Por pli kontentiga kaj sekura mondo

Universala Baza Enspezo helpas ĉiujn homojn
Anstataŭ bezoni labori por travivi, la plej multo de homoj povas fari kion ili vere volas fari sen ĉagreno pri ekonomia sklaveco.
Komputiloj kaj lertaj maŝinoj detruas la eblecon de homa laboro kaj riĉigas nur 1%





# *oops!* **ups!** kaj ree **ups!**

**Kontrolisto de la sorto de la Homaro.**

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Humurbildojn





Multe da humurbildoj (kun komentoj) mi prenas el E-retpaĝoj!
Mi nur por iuj BILDOJ (eble triono?) aldonas mian komenton (rimarkon, ŝercon)...Mi estas nur KUNaŭtoro de iuj bildoj!
Sube estas ligilo al mia magazino de jam prezentitaj humurbildoj...
Iru tien kaj prenu! https://tiny.pl/rn9gc










La malapero de la dinosaŭroj

https://tiny.pl/rn9gc_ Kun elkoraj salutoj ***Marian** ZDANKOWSKI*

# Prelegserio de AEA




Dimanĉo la 21a de marto estis la 3a dimanĉo de la monato. Kiel planite okazis la du prelegoj organizitaj de la Aŭstralia Esperanto- Asocio kadre de la prelegserio. Aparte interesis min la prelego de Paŭlo Sergio Viana pri la rekreado de la paradizo de la Atlantika arbaro, rezulto de la laborego de Sebastião Salgado kaj lia edzino . Al la demando : “ Kiel Sebastião estas konsiderata en sia lando, Brazilo? “ ne surprizis min aŭdi ke plejparte de la homoj simple taskas lin maldekstrulo. Kompreneble en la etoso kreita de Jair Bolsonaro iu ajn , kiu agas en maniero kiu evidentigas la damaĝojn kreitajn de la nuna brutaro -industrio kaj, kiu ne glorigas monon kaj tujan profiton meritas esti konsiderata ĉu kiel maldekstrulo, komunisto , danĝerulo por la ekonomia sistemo, ĉu kiel ridindigulo kiu volas ke homoj reiru al siaj kavernoj. Ĉu tio memorigas vin pri antaŭnelonga interŝanĝo, kiu fontis el la sama diferenco de ideraro, en Aŭstraliaj Esperantistoj?



*Franciska Toubale*

**La tialo pro kiu mankas informo pri via klubo estas ke via klubo ne sendis ĝin al AE**

Kie estas amo, estas vivo. *Gandhi*  Kie estas malamo, estas morto *Roger S*

Se ni scius, kion ni faras, ĝi ne nomiĝus esplorado, ĉu ne? *Albert Einstein* 

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***




Britio nun konstruas, je grandega kosto, novajn militajn submarŝipojn, kapablaj detrui la vivon sur nia planedo, por anstataŭi siajn Trident submarŝipojn. Ho ve, mi feliĉas ke mi estas maljuna. De kie venos la mono? Ĉu ne estas iu pli bona celo por la homaro? *Roger S*

# El Brizbano


Post longa tempo la membroj de la Brizbana Esperanto Societo renkontiĝos denove je la lasta dimanĉo de la monato. Ni renkontiĝos Dimanĉon 28an de Marto, Tempo: 14:00--16:30 Loko: "*Brisbane Square Library* " ( *community room*)

**Programo:** Raportoj, JARKUNVENO, Klaso Poste : Babilado ĉe la proksima kafejo. ČIU BONVENA *Petro Danzer*



**Kaj Bela Dendrobium orkido floras en la ĝardeno de Petro**

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*




https://ghalev.itch.io/risus

# "Bonvenon al Risus: Risus: La Ĉiuspeca Rolludo

La Ĉiuspeca Rolludo, plena plumo-kaj-papera rolludo!
Por iuj, Risus estas konvena "kriza" rolludo por improvizaj ludoj kaj rapida rolula kreado. Por aliaj, ĝi estas fidinda kampanja sistemo, subtenanta jarojn da ludado. Por ankoraŭ aliaj, ĝi estas stranga broŝureto kun baston-figuroj. Por mi, ĝi estas ĉiu tri, kaj kun ĉi tiu eldono, Risus festas ne nur dudek jaroj da ekzistado, sed dudek jaroj da vivo, stimulita per entuziasma monda komunumo, sindonema je pligrandigi ĝin, festi ĝin, disvastigi ĝin kaj ludi per ĝi.

## Rolula kreado

La rolula Kliŝo estas la koro de Risus. Kliŝoj estas mallongigo por speco de ulo, signifantaj iliajn lertaĵojn, fono, socia rolo kaj pli. La "Klasoj" de la plej maljunaj rolludoj estas daŭrantaj Kliŝoj: Sorĉisto, Detektivo, Stelpiloto, Superspiono. Vi povas elekti Kliŝoj tiel tiuj por via rolulo, aŭ elpensi ion pli malmoderan, kiel Fantoma Piratkuiristo, Fea Baptopatrino, Bruce Lee (por rolulo kiu faras Bruce Lee aferojn) aŭ Giganta Monstro Kiu Simple Volas Esti Amata Pro Sia Makramo - ion ajn vi povas pripersvadi vian Ludomastron (LM). Se vi havas tre ĉiopermesan LM, vi povus esti ĉiuj de ĉi tiuj samtempe. Ĉiu Kliŝo havas taksadon en ĵetkuboj (la ordinara ses-edra speco). Kiam la povo de via rolulo kiel Sorcisto, Kosmopiloto aŭ Bruce Lee estas defiita, rolu nombron de ĵetkuboj egala al la taksadon.  Tri ĵetkuboj estas "profesiulo". Unu jetkubo estas "aĉulo". Ses ĵetkuboj estas plej supera majstreco.
Komplete Risus-rolulo aspektas tiel:

Grolfnar Vainsson la Vikingo
Priskribo: Alta, blonda, kaj ridetema. Ŝatas drinki kaj batali kaj drinki kaj ĉasi Vikingajn virinojn kaj batali kaj veladi sur la grandaj maroj kaj marodi. Deziras verki grandajn sagaojn pri si.
Kliŝoj: Vikingo (4), Vetludanto (3), Donĵuano (2), Poeto (1)

Por krei Grolfnnomi nin, priskribi lin, kaj asigni siajn Kliŝojn. Vi ricevas dek ĵetkubojn elspezi por Kliŝoj, dividita kiel vi volas, por kiel multe aŭ malmulte Kliŝoj kiel vi decidas (sed pli ol dek estus tre stange, konsiderante) . La unua Kliŝo listita por via rolulo ("Vikingo", en la kazo de Grolfnar) estas sia Unuvica Kliŝo - la Kliŝo kiu plej klare esprimas kiel via rolulo rigardas sin. Ĝenerale, novaj rululoj ne rajtas havi Kliŝojn taksitajn pli ol 4 ĵetkuboj, la "Vikingo" Kliŝo de Grolfnar estas la maksimumo por komenca rolulo. Via LM povas elekti vastigi, malstreĉigi aŭ alie transformi tiajn parametrojn pro sia ludo
(demandu se vi ne estas certa). Dankon Ŝohano *(Shayne Power)*



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917



# N i a d e m o k r a t e c o .

## DEMOKRATECAJ DIKTATUROJ.

Kontraŭdiro, sed signifanta ke ni vivas en landoj kie la centprocenta potenco apartenas al la grandegaj korporacioj kaj bankoj, sed kiuj lastaj permesas al ni libere diskuti kaj publikigi opiniojn kontraŭ tiu situacio. Ni do ne bezonas timi, kiel oni devas en diktaturaj landoj. Nur se ni penas praktike forpuŝi ilian potencon, ili agos kontraŭ ni, plej ofte sukcese. Ekzistas ankaŭ reĝimoj, kiel Ĉinujo, kiuj staras inter la danĝeraj kaj la demokrataj diktaturecoj. Estas por preskaŭ ĉiuj civitanoj pli agrabla loĝi en demokrata diktatoreco kaj ni batalu kontraŭ politikaj grupoj kiuj intencas doni al nia lando danĝeran diktaturon kiaj la naziistoj kaj la islamŝtatistoj. *Marcel Leereveld.*

## PRI MIAJ AVINOJ .

Ĵusosemajne mi rakontis pri miaj avoj, do nun pri miaj avinoj.

Mia perpatra avino, kiu edziniĝis al la viro diradanta "Dio estas fiaĉulo, ĉar li forprenis el de mi mian patrinon", havis naŭ naskojn, de kiuj sep pluvivis post la naskiĝo. Havi tiom da gefiloj kreis multe da laboro por ŝi, tiel ke dum la edzinado ŝi ne povis fari kulturajn laborojn. Ŝi klarigis al ni, ŝiaj genepoj, ke havi pli ol du aŭ tri gefiloj estis stulta, sed virinoj en tiu tempo juĝatis maldecaj se ili ne naskis multajn. Se ŝi havus tempon, ŝi estus tre klera aktorino, ĉar ŝi bonege kapablis imiti la homojn ĉirkaŭ si. Eĉ nereligiuloj kiel ŝi devis obei tiun kutimon de multinfaneco. Ŝi ĉiam estis helpema kaj inventema al siaj genepoj, kaj mi amis ŝin pli ol mian patrinon. Ŝi laboris forte por "savi" la geedziĝojn de siaj gefiloj, kie necesis. Ŝi estis tre ama al bestoj, kaj savis fremdajn hundojn, katojn, birdojn, kie ŝi povis. Dum la lastaj dek-kvin jaroj de sia vivo ŝia edzo, mia avo, sidis sur seĝo farante nenion aŭ legante la ĵurnalon "ĉar li meritis tion post longa labortempo en sia fabriketo". Lia edzino, mia avino, ne povis permesi al si tian lukson, ĉar ŝi estis virino kaj plu devis prizorgi sian loĝejon, la tutan tagon. Kiam maljunaj, ili aĉetis la uzon de hotelo en Hilversum, por investi sian monon, sed tio malsukcesis, unue ĉar la laboro purigi luatajn ĉambrojn estis tro da laboro por mia avino, kaj due ĉar la avo konsiladis al longtempaj drinksesiuloj ke ili bezonas iri al siaj edzinoj por helpi kaj akompani ilin. Ili perdis monon ĉe la revendado de la hotelo. En Nederlando dum la tre mallonga somero svarmas ĉirkaŭ la domoj tre malagrablaj muŝoj, sed mia avino sciis solvon: ŝi metis poton kun kuiritaj fiŝrestaĵoj en la alia flanko de la ĝardeno, kaj ŝi ne havis muŝojn en aŭ apud la domo. Kaj ŝi eĉ facile povis venenigi la muŝojn, se ŝi volis.

Mia perpatrina avino estis blinda dum la dua duono de sia vivo. Ŝia devizo estis: oni ĉiam devas havi varmajn piedojn kaj nevarmajn manojn. Ŝi vivis sufiĉe longe, sed escepte de sidadi en seĝo faris nenion dum sia blindeco, same kiel mia alia avo faris nenion kiam maljuna kaj neblinda. Ŝi estis bonŝanca havi tre helpeman edzon, mian avon. Sed post ŝia morto mia avo fariĝis mense infaneca, kaj, en nia domo, invitis junajn knabinojn viziti lin kaj sekse amuzi ilin. Tio kompreneble ne povis daŭri longe, ĉar la knabinoj diris tion al siaj gepatroj, kiuj informis la policon. Kvankam li loĝis en ĉambro en nia loĝejo, ni nenion sciis pri la afero. Anonciĝis procedo, sed ree lia katolika eklezio savis lin. Ili devigis unu el siaj menskuracistoj deklari lin mensmalsana, kaj rezulte de tio li sendatis en mensmalsanejon kaj ne en malliberulejon, kun

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

sia ligna kruro. Sed li tamen multe suferis esti kun homoj kiuj ne normale interdiskutas, ĉar lia menso estis tute sana kaj logika, escepte por sia infaneco. Li baldaŭ mortis pro suferi mensmalsanulojn.

La ĉi suprajn informojn pri miaj geavoj donis al mi miaj tre fidindaj onklinoj.

Marcel Leereveld.

## AVERTO .

Mi avertas Esperantistojn (kaj ĉiujn) ne rilati kun iu ajn turka esperantogrupo aŭ organizo, ĉar mi scias, ke la sekreta polico permesus al ili ekzisti nur se ili laboras por la turka spionorganizo kiu serĉas informojn pri kontraŭuloj de la nuna brutala diktatoreco en Turkujo. Ĝi havas siajn spionojn en ĉiuj landoj, same kiel estis la kazo en la Stalin-Rusujo, de kiu ĝi sendube lernis. Ankaŭ ne parolu pri la reĝimo de Turkujo al certaj aŭ supozataj rifuĝintoj el Turkujo, ĉar tio tre embarasus ilin. Turkoj en aliaj landoj ne volas montri sin kontraŭ Erdogan ĉar la spionoj estas ĉirkaŭ la angulo por kapti ilin se ili povas pruvi tion pro viaj paroloj. Do neniam parolu al turkoj, speciale esperantistaj, pri la reĝimo de Erdogan en nuna Turkujo. Jam multaj centoj da kontraŭdiktaturaj turkoj mortigatis, kaj aliaj estas aŭ forflugintaj aŭ en karceroj. Ne parolu !

Mi emfaze deklaras, ke la A.E.-redaktoro estas neniel respondeca pri kio mi skribis ĉi supre. Nek estas miaj samfamilianoj, kiuj ĉiuj tre ŝatas Erdogan. Nur mi estas kontraŭ Erdogan, kaj miaj nomo kaj adreso estas: Marcel Leereveld, 12 Heather Grove, Belgrave South, 3160, Aŭstralio. M. L.

*Marcel Leereveld.*



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)* **SOLVO DE LA KVIZETO**

1). La vorto estas "esti".
2). "..... (ke) li fariĝos(-u) prezidanto".
3). "Ni en la vespero intencos" + "Ni intencos en la vespero elekti" + "Ni intencos elekti en la vespero".

*Marcel Leereveld.*



**3ZZZ** En la elsendo de la 22a de marto troviĝas informoj pri la vivo de abeloj kaj viglaj kantoj *Franciska Toubale*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso** Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajno post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA.

# Universala baza enspezo (UBI)



**Por pli kontentiga kaj sekura mondo.**

Ekonomiaj sklavoj estas esencaj por ebligi militojn. *Roger Springer*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***